

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj akministrazio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E.J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo,) Eusebio. Maynar (Hispanujo), Prof. H.G. Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W.J.A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono.).

P R O T E S T O

En la antaŭa numero ni publikigis artikolon 'Kiel la vino evoluis en Francujo'. Ne estis necesa tiu artikolo. Estus eble publikigi alian verkajon, kun alia enhavo. Miris ni ricevi jenan poŝtkarton:

'Tre estimata samideana redaktoro!

'Kun granda mirego mi legis en la lasta numero de ESPERO KATOLIKA la artikolon pri la 'vino en Francujo'. Bonvolu, kara samideana redaktoro, 'akcepti mian proteston tre gravan kontraŭ ĉi tiu artikoleto.

'Mi protestas ankaŭ en la nomo de multaj gesamideanoj katolikaj en Aŭstrujo. Kelkaj el ili skribos al vi, kiel mi scias. En tempo, en kiu la 'dangeroj de alkoholismo mortigis multajn homojn, vi varbas kaj propagandas la alkoholismon. La Espero Katolika estas tre malgranda, multaj interesantaj artikoletoj ne publikigis, sed vi havas spacojn kaj foliojn 'por ĉi tiu propagando de la vin-interesuloj. Mi informas vin, ke la varbado por E.K. en la katolikaj rondoj Esperantistaj en Aŭstrujo estas tre 'malfaciligita kaŭze de ĉi tiu artikoleto. Niaj gesamideanaj katolikoj en 'Aŭstrujo certe ne estas ĉiuj abstinentuloj, sed ili scias ĉiuj, ke la alkoholismo estas la plej granda dangero en la socia vivo de la 20a jarcento, kaj ili ne volas ke nia gazeto, nia revuo, kiu varbu por Esperanto, varbu por la alkoholismo.

'Kun samideanaj salutoj sincere via.

Ni scias ke ofte oni flustras kritikojn kontraŭ la enhavo de nia revuo. Nur tre malofte ni ricevas koncizan reakcion, kiel la publikigitan. Certe ni estus povinta forŝovi ĝin kiel senvalorajon, sciante ke la plimulto el niaj legantoj agas sammaniere. Ni ne faris tion por kapti la okazon doni kelkajn pensojn pri la diversaj temoj, kiujn la skribinto tuŝas. Preskaŭ ĉiu persono havas sian amatan ĉevaletan. Ankaŭ ni. Tamen decas, ke oni tenu la bridojn, por ke ĝi ne konduku la mastron al nedezirataj lokoj. La skribinto eble rajdas la abstinentcan movadon. Bone kaj tre laŭdinde.

Konante la klerecon de la skribinto, ni tamen hezitas kredi ke li sufiĉe atente legis la enhavon de la artikoleto. Ĉu li eble nur legis la titolon. Ni tute ne povas trovi vortojn aŭ frazojn per kiuj ni propagandis la alkoholismon (kiun ni abomenas same kun li!). Ĝi certe ne estis propagando por aŭ de la vin-interesuloj, por tio nia revuo estas tro simpla. La amata ĉevaleto indikis la vojon! Ĉe aliaj personoj la besteto nomiĝas: anti - tabaka, kontraŭfilma, vegetara, porrelegia, kontraŭkomunisma, militrezistado, kultura, ktp. ktp. eble por ĉiu persono aparta temo. Laŭ la persona koncepto ĉiuj aferoj nur estas bonaj aŭ malbonaj, kiagrade ili harmonias kun la persona vidpunkto. Pli grava la afero fariĝas, se oni deklaras, ke diversaj aliaj personoj samopinias, kaj ke oni parolas nome de tiu grupo. Ni scias ke eĉ en ege gravaj aferoj oni deklaras esti la laŭtparolilo de grandaj amasoj, tamen oni forgesis unue konsulti tiun grupon, kaj tio havas tiam tute kontraŭan efikon. Mi povas garanti la skribinton, ke lia protesto ĝis nun estis la ununura!

Tamen ni povas kompreni lian sintenon laŭ lia koncepto de abstinenco. Kaj ŝajnas al ni bona okazo ion diri pri la abstinencmovado. Unue kelkaj ĝeneralaj rimarkoj.

La abstinencmovado antaŭ jaroj sin prezentis kiel kontraŭ la alkoholismo, deklarante ke ĝi volas forigi la mizeron de la misuzo de alkoholaĵoj. En tiu celado ĝi ne havis sukceson. Certe ĝi ne logis la trinkulojn al pli bona vivado. Bedaŭrinde por ambaŭ, sed la faktoj parolas klaran lingvon. La moderna abstinencmovado tamen propagandas tial la personan perfektigon per propravola abstino de alkoholaĵoj, tabakaĵoj, ktp. Kaj fakte ĝi estas sobrecmovado. En tiu senco la kompleta abstinenco estas tute alia afero ol la sobreco. Tial ĝi estas tute propravola, kaj nur povas servi al la persona perfektigo en la spirita vivado. La bona ekzemplo nur estas akompananta faktoro. La abstinentuloj mem ne akordiĝas ĉu oni devas konsideri la vinon kiel alkoholaĵo. La abstinencmovado en multaj landoj permesas al siaj anoj la uzadon de vino. Kaj la mondkongreso de abstinentuloj, kiu okazis antaŭ kelkaj monatoj en Parizo, estis invitata kaj akceptata de la aŭtoritatuloj per vino. Certe estis kelkaj protestoj, sed ne ĝenerala abomeno. Kaj kion pensi pri la edziĝfestoj en Kanao, kie Kristo ne aliĝis vinon en akvon, sed akvon en vinon kaj la Evangelio aldonas ke ĝi estis de bona kvalito. Krome la vino estas necesa ingredienco por festi la S-tan Meson, la Liturgion.

Ĉu la sobrecmovado estas superflua en la nunaj tempoj? Certe ne. La ebrieco ne estas kutimo ĝenerala en la civilizitaj landoj. Tion oni ne povis diri antaŭ duona jarcento. Sed ke ĝi tiel plimaloftiĝis, estas kaŭzo de la grandaj impostoj, kiujn la registaroj postulas pri la alkoholaĵoj. Kaj due pro la materia antaŭeniĝo de la plimulto de la homoj, do speciale de la laboristoj, kaj jen pro kio la abstinentuloj ne sukcesis. Ili eraris en kaŭzo kaj sekvo. La ebrieco ne estis kaŭzo, sed ĝi estis sekvo de la mizera stato, en kiu multaj personoj devis vivi. En diversaj landoj, regionoj, medioj, la kaŭzo ne ankoraŭ estas forigita. Ĉi tie estas tasko por ĉiu kaj speciale ankaŭ por la abstinentuloj, kiuj montras tiom de homamo.

Sed oni bone pripensu ke la solvo ne ekzistas en apartaj personaj faktoj sed en organizado, finfine sur la politika tereno, same kiel agas pri salajroj, domoj, respondecoj, ktp.

Kaj estas bedaŭrinde ke nia esperantistaro liveras ne sufiĉe da personoj, kiuj povas findecidi pri tiuj aferoj.

La alkoholismo ne estas la plej granda danĝero de la 20a jarcento. Plej grave ĉiam restas la socia problemo. Kaj al tiu aldoniĝas la problemo de la harmonia nerompigebla edzeco. Ni nur observu la admonojn de niaj lastaj papoj kaj de niaj episkopoj.

Multaj interesantaj artikoletoj ne publikiĝos, diras la skribinto. Li pravos. Sed li forgesis aldoni interesplenan verkaĵon, ĉar verdire la enhavo de la redaktora paperujo estas ege malinteresa. Denove ni volas aldoni ion pri la enhavo de nia revuo.

La internacia movado de ĉiaj aferoj havas gravan kontakton en Bruselo.

Per ĝi ni scias la milojn da internaciaj kaj naciaj kongresoj, konferencoj, ktp. De ĉiuj ni scias la datojn, temojn, lokojn, ktp. ktp. Kun iom da ĵurnalista fantazio ni povus fari raporteton de ĉiu por la tagĵurnaloj. Kaj verdire en iama deĵoro ni faris tiajn malkorektaĵojn. Tamen tiaj raportoj tute

ne estas adaptaj por monata revuo. Per ĝi oni volas doni ion pli gravan, kio restas iom pli longe en la memoro por cerbumi.

La Kongresoj de la Katolikoj en Berlino kaj en Vieno, estis tre gravaj, eĉ laŭ internacia vidpunkto. Tamen per la al ni senditaj raportoj ni scias malpli pri ili ol per la antaŭe senditaj programoj, kiuj estis tre ampleksaj. Kion diris la elstaraj parolistoj pri la diversaj sociaj problemoj, pri la liturgia movado, pri la edzeco en la moderna tempo, pri la misioj, kt., ktp. Certe nia movado celas ke Esperanto estu uzata en katolikaj medioj, sed neniam ni sukcesos kiam montriĝos 'ke l' Esperantistoj parolas nur pri Esperanto' (E.K. n-ro 1, okt, 1903, 3a linio!!!)

Se Esperanto servas al la disvastiĝo de la bonaj ideoj en larĝa ĝeneraleco, ĝi samtempe disvastiĝas mem!

J.

AŬSTRIA KATOLIKA KONGRESO en Vieno

(Österreichischer Katholikentag)

La ĝenerala temo de tiu kongreso estis 'LIBERECO KAJ DIGNO DE L'HOMO'.

La kunvenoj okazis de la 11a-14a de septembro pasinta. La kongreso estis la unua tia post la militfino, kaj la lasta okazis en 1933, do antaŭ 19 jaroj. La Sankta Patro, volante sendi oficialan delegiton, distingis per tiu alta ofico la ĉefepiskopon de Vieno, al ni jam bone konata ankaŭ kiel granda favoranto kaj fervora akcelanto de Esperanto kaj de nia afero esperantista. Estis do eknomata Kardinalo d-ro. Th. Innitzer papa legato! Veturinte Romon kaj revenante Aŭstrujon, li estis akceptata kun ĉiuj honoroj, kiujn oni dediĉas al 'suvereno', de la Federacia Prezidanto kaj la membroj de la registaro. Ĉe la solena akcepto flanke de la ekleziularo kaj tuta katolikaro ankaŭ delegitaro de la katolikaj esperantistoj oficiale partoprenis kun sia bela, ofte admirata flago, impone portata de nia juna s-ano Reiter el Salzburg. Tiu flago estis benata dum la granda 'Katholikentag 1933' de Pastro Font Giralt, tiam IKUE-prezidanto, kiu kelkajn jarojn poste mortis kiel martiro en sia patrujo Hispanujo. La flago depost marto 1938 troviĝis bone gardita en la Viena Ĉefepiskopa Dioceza Muzeo kaj nun ree aperis kaj brilis festece. La specialaj aranĝoj de la katolikaj esperantistoj dum la nunjara 'Katholikentag' trovis limon per la grandaj ĉefaj aranĝoj, kiujn ili ne devis tuŝi. Lastaj estu jen menciataj:

La oficiala Malfermo (Jaude II-IX vespere) post la enkondukaj Di-servoj en ĉiuj preĝejoj de Aŭstrujo, estis en la granda Koncertsalonego. Ĉeestis ankaŭ la federacia prezidanto, d-ro h.c. Körner (socialista partiano), membroj de la registaro, la urbestro de Vieno Jonas (socialista partiano) kaj multaj aliaj. Ĉefparoladon faris la jesuita pastro, unoversitata prof-o d-ro Hugo Rajner el Innsbruck pri 'Aŭstra Confiteor kaj Gloria', profundsignife, kaj treege serioze aktuale. La solena vespera meso en la vasta stadiono (vendredo 12-IX) post la 20a h. Malgraŭ forta pluvado antaŭe, ventego kaj malvarmo ĉeestis proks. 70.000 personoj. Ĝi estis celebrata por la persekutataj fratoj, predikis tiusence kortuŝige kaj ekflamige urba paroĥestro E.J. Mayer Samtage antaŭtagmeze estis Di-servo sur 'Kahlenberg' memore je la defenda venko kontraŭ la turka atako (12-IX-1683). La dato estas memoro je la origino de la festo de la Sankta Nomo de Maria.

Dimanĉe (14-IX) la ĉefaj aranĝoj estis: Solena s.meso celebrata de papa legato kardinalo d-ro Innitzer, kiu ankaŭ predikis pri la 'kruco' okaze de la festo 'Altigo de la kruco'. En la posttagmeza manifestacio parolis d-ro Lorenz (laikulo) kaj pastro konsistora konsilanto Mauer. La prezidantino de la Berlina 'Katholikentag', s-ino Klausener salutis la kunvenintojn. Partoprenis entute 250.000 personoj.

LA ESPERANTISTAJ ARANĜOJ.

Vendrede (12-IX) posttagmeze okazis la interkonatiĝa renkonto en la Internacia Esperanto Muzeo, kore bonvenigataj kaj gvidataj de ties fondinto kaj direktoro, kortega kons. H. Steiner.

Sabate (13-IX) je la 10a okazis Di-servo en la bela preĝejo je Sta. Elizabeto. Celebris kaj en Esperanto enhavrice kaj sencplene predikis pri 'La paŝtista ofico de Jesuo en la mondhistorio' komandora moŝto pastro Georg Plank

La gesamcelanoj en Esperanto liturgie preĝis kaj kantis E.-lingve parte 'Schubert-meson' kaj je la fino 'Granda Di'!

La FESTKUNVENO, samtempe memorado je '40 jarojn Katolika Esperanto Movado en Austrujo' okazis en la Thomas-salonego. Ĉeestis 200 personojn. Prezidis ministra kons. d-ro M. Fuhring (AKLE-prezidanto) kiu ankaŭ transdonis la salutojn de instru-ministro d-ro Kolb. Post prelego de alta akribaĵo kun 'bendeziro kaj bensaluto' de kardinalo d-ro Innitzer, la kunvenantaro entuziasme esprimis sian dankon kaj plenan sindonemon al la Sankta Patro kaj ties legato, la ĉefpastro Viena, antaŭe nomita. Envenis sakutleteroj de IKUE-prezidanto prof. Beckers, de iama instru-ministro d-ro Hurdes, de ĝen. poŝta dir. d-ro Dworschak, k.a. Alparolis la kunvenon la diocezaĵaj esperantistaj gvidantoj, k.a.

Fino R. Jünger deklamis poemon 'Al nia flago' (de W. Mudrak). La afergvidanto s-ro Mudrak donis historian raporton koncizigitan pri la katolika esperanto-movado en Austrujo ek de ĝia fondiĝo la 11-IX-1912, dum la Eŭkaristia Kongreso en Vieno. Li memoris la mortintajn pionirojn, i.a. p. Mestano d-ro Metzger, G. Weber kaj L. Chiba. Deklamis en germana lingvo f-ino L. Toscani kaj en E-lingvo s-ro Gasperini la poemon 'Einheitssprache' (Unueca lingvo) dediĉita al la katolikaj esperantistoj de la fama aŭstra katolika poeto kaj kulturfilozofo Richard v. Kralik. La festparoladon faris pastro karmelita Suitbert Siedl, denaska esperantisto, pri 'Esperanto en servo de internacia katolika kunagado kaj de venko kontraŭ homajn libercon kaj dignon malrespektanta naciismo'.

Dum la tuta semajno de la 'Katholikentag' estis vizitebla Katolika Esperanto Angulo en la vendejo 'Wiener Dom Verlag' (Viena Katedrala Eldonejo), aranĝita de AKLE. Tio dank'al la komplezemo de prelato Fried, ĉefredaktoro de 'Wiener Kirchenblatt', kiu favoras Esperanton.

La festkunveno estis anoncita en la oficiala gvidlibro de la 'Katholikentag'

M.

LA INTERNACIAJ FAMILIAJ TAGOJ EN OXFORD.

La stabileco de la familio, profunde influita de du militoj kun nur interspaco de 20 jaroj, estas plimalfortigita en ĉiuj landoj ankaŭ pro eksteraj faktoroj ekonomiaj kaj sociologiaj, kaj de internaj faktoroj psikologiaj, pedagogiaj kaj spiritaĵaj. Jen frazo el la broŝuro de la kongreso de Oxford, kiu bone indikas la temon kaj la gravecon de ĉi tiuj studtagoj, Partoprenis 20 landoj kun 250 deligitoj. La dukino de Gloucester estis patronino de la kongreso. La kunvenoj okazis en la fama S-ta Johano-Kolegio. Dum kvar tagoj la kongresintoj studis la ekonomiajn, psikologiajn, pedagogiajn kaj spiritaĵajn faktorojn de la familia stabileco

La ekonomiaj faktoroj.

Prezentis la raporton la iama franca ministro Prigent, s-ro Rey, gvidanto de la Svisa Popola Movado por la Familio, f-ino Arnould de la Familia Popola Movado en Belgujo kaj s-ro Wynen, afergvidanto de la loĝejkaso de la Belga Ligo de Multinfanaj Familioj. La parolantoj speciale atentigis kiel la ekonomiaj faktoroj de la familia nestabileco la diferencon en vivnivelo inter la familioj kiuj havas infanojn kaj kiuj ne havas ilin. Laŭ la 'skalo de Oxford', kiu laŭ sciencaj manieroj fiksis la vivkoston de plenkreskulo, lia edzino kaj liaj infanoj, oni rimarkas ke familio kiu havas tri infanojn de respektive 4, 7 kaj 10 jaroj aĝaj, devas havi la enspezon, kiu devas esti pli ol tri foje la enspezo de needziĝinta persono. En ĉiuj landoj de la mondo oni estas ankoraŭ tre malproksime de tiu idealo. Tial oni ne devas miri ke la deficiito de la enspezoj havas gravajn sekvojn: plialtigo de la mortoj de infanoj kaj virinoj malplialtigo de la naskiĝcifero; aborto; kaj la neceso de la patrinoj por akiri la necesajn enspezojn per eksterhejmaj laboroj. La parolantoj referencis al la internaciaj esploroj, kiuj pruvis ke la ĉeesto de la patrino en la hejmo estas necesa por garanti la korpan kaj spiritaĵan evoluon de la juna infano. Tamen oni faris ion por plialtigi la vivnivelon de la familioj; enketo de la Internacia Labor-Oficejo, publikigita en 1950a, montras ke el 45 enketitaj landoj kun 684 milionoj da enloĝantoj, jam 23 landoj kun 273 milionoj da enloĝantoj havas sistemon por monaj profitoj al la familioj. Nur 9 landoj donas, familiajn kontribuojn al la tuta popolo, sed kelkaj el tiuj donoj estas tre malaltaj. Unu el la kaŭzoj de la nestabileco estas la loĝejo. S-ro Wynen akuzas la individuajn antaŭjuĝojn, kiuj eligas ĉe la publika opinio en la naciaj

kaj internaciaj medioj kaj per kio ankaŭ la teknikistoj de la konstruaĵoj kaj de la urbplanologio estas infektitaj. Li sugestis diversajn formulojn kaj manierojn, same por la arkitektoj, kiel por financado, por akiri ke ĉiuj familioj havu egalan ŝancon je konvena leĝejo.

La psikologiaj faktoroj

La unuanimeconinter la gepatroj; la rilatojn inter la gepatroj kaj la infanoj kaj la rilaton inter la familioj kaj la ŝtato estis respektive priparolataj de prof-o David R. Mace el Usono kaj d-ro Hans Achinger el Germanujo. La vera unuanimeco inter la gepatroj ŝajnas esti la unua kondiĉo por la bonaj rilatoj en la fizia sfero. Ofte oni troigis la signifon rilate la malpli feliĉaj edziĝoj; la bonaj rilatoj devas ankaŭ ekzisti en la spirita kaj karakteraj ecoj. Por sperti la feliĉan edzecon la viro kaj la virino devas esti bonaj kamaradoj kaj amindumi unu la alian. Ne sufiĉas la unua sen la alia. La bona rilato devas esti de spirita karaktero, kio signifas ke la viro kaj la virino devas havi la saman filozofian vivkoncepton kaj ili devas havi altan idealon, kiu ebligas al ili travivi la malfacilajn okazotaĵojn.

La nova generacio posedas novan realismon kaj novan idealismon.

Oni povas aplaŭde aprobi tiujn du simptomojn, ĉar ili ebligas fari el la edzeco pliriĉigantan vivstaton. La dua parolinto intencis pruvi ke la feliĉo kaj la stabileco de la plenkreskulo dependas de la familia medio, kiun li spertis dum lia juneco. Li pruvis ke la rilatoj inter la patrino kaj la infano estas vera vivkomuno. La nutrado de la infano de la patrino ne nur havas signifon kiel nutraĵo, sed ĝi havas grandan influon je la nervsistemo.

Fine d-ro Achinger esploris la rilatojn inter la familioj kaj la socio kaj li konstatis ke la kunagado inter tiuj du ankoraŭ estas malproksime de vera harmonio kaj idealo. Tro ofte li diris, la ŝtato helpas al la familioj forprenante de ili la respondecon kaj substituante sin mem en ilia funkcio. Sed oni devas fari la kontraŭon kaj plifortigi la familiojn helpante ilin materie kaj spirite por ke ili plenumu sian taskon. Anstataŭ doni supon en la lernejo, oni devus doni al la familioj sufiĉajn enspezojn por ke ili mem nutru dece siajn infanojn. Tio estus pli utila kaj pli valora.

La pedagogiaj kaj spirita faktoroj.

La ĝenerala raporto pri ĉi tiu temo estis prezentata de s-ino Colini-Lombardi, membrino de la itala parlamento. Faris komunikojn s-ro Sukselainen, membro de la finlanda registaro; s-ro E. Moore el Usono kaj d-ro Monsaingeon el Francujo. Ĉefa temo estis la formado de la familia vivo kaj la preparo al la edzeco. Ili donis informojn pri la tasko de la gepatroj, la psikologiaj konsilantoj kaj la kuracistoj. La tuta vivo devas esti preparo al la edzeco. Sed tio okazu prefere nekonscie. Tamen konscia preparo ankaŭ estas necesa. La tereno de la seksa informado devas esti rezervata speciale al la gepatroj. Oni devas speciale ne uzi komunan seksan informadon, ekzemple en lernejoj. Feliĉe en diversaj landoj ekzistas movadoj, kiuj helpas al la gepatroj pli bone kompreni ilian taskon. Ekzistas familiaj movadoj en Belgujo, Francujo, Italujo, kaj Nederlando; ekzistas kursoj por gepatroj en Belgujo kaj Francujo. Francujo, Nederlando, Anglujo, Usono, Italujo havas oficejojn por konsili en edzec-kaj familiaj malhelpoj.

Ĉi tiujn prelegojn estis sekvataj de raportoj de religiaj institutoj pri la maniero en kiu la katolika, protestanta kaj juda eklezio streĉas al la protektado de la familia stabileco. Ankaŭ tre interesaj estis la komunikoj de Abbe Caffarel, estro de la 'Ora Ringo', de s-ro G. Hourdin, redaktoro de la revuo 'La Katolika Vivo' (ambau el Francujo), de s-ino Kathleen Bliss eksestrino de la angla 'Kristana Novaĵ-Letero' kaj de la ĉef-rabeno de la Brita Imperio. Nur unu lasta impresio, la diskutoj estis malfacilaj. Kiel ĉe aliaj internaciaj kongresoj la lingvaj malfacilaĵoj malhelpas tion. En ĉiu plebicito pri ĉi tiu temo la gepatroj deziras ke la lernejoj solvu ĝin.

R.

LA MUZEO DE LA PIRENEOJ EN LOURDES

(Okaze de sia pilgrimado al Lourdes tri samideanoj de Verona havis oportunecon viziti la tiean muzeon, kies konservatoro estas esperantisto: S-ino Le Bondidier, kun granda afableco ŝi gvidis ilin en la vizito kaj donis al ili ĉiujn klarigojn kaj ili, per la publikigo de ĉi tiuj notoj, intencas esprimi sian dankon pro ŝia gentileco)

En la moderna historio de la urbo Lourdes du datoj konstituas verajn turniĝojn 1858a pro la aperoj de la Sankta Virgulino, aperoj kiuj igis el ĝi la Sankta

urbo de la Pireneoj; 1921a kiu vidis la veran reviviĝon de ĝia fortik-kastelo (Châteaufort) kaj la kreo de la folkloro muzeo de la Pireneoj.

Fiere kuŝanta sur roka pinto, la kastelo apartenas al la historio. La loko kiu gardas la tutan valon, estis fortikigita jam de la roma epoko. Pli malfrue Karlo-la-granda (Charlemagne) tie sieĝis la saracenojn kiuj estis ĝin konkerintaj. Kaj dum la tuta mezepoko alsaltoj kaj bataloj sinsekvadis por la posedo de la bruta roko. Poste estis la silento kiu sekvis la frakasbruado de la bomboj, sed silento kiu etendis sin kvazaŭ plomba ĉapo: la fortiko estis transformiginta en regna malliberejo, en speco de provinca Bastilo, kien oni enfermis, per simpla reĝa letero, politikajn kontraŭulojn kaj ĝenantajn altrangulojn.

Antaŭ sesdeko da jaroj la regno cedis la ruiniĝintan kastelon al la urbo Lourdes, kiu malfermis ĝin al la turismo, sen, tamen, zorgi por iu ajn riparo. Estis tasko de du apostoloj de la pireneismo - gesinjoroj Le Bondidier - allogitaj de la historia kaj turisma riĉeco de tiu loko - doni al ĝi novan ekzistadon, fari el ĝi tion kio ĝi estas nun: belegan ekzemplon de regiona muzeo kaj samtempe unuarangan altiran centron por varmaj naturamantoj.

Tiam kiam ili entreprenis tiun laboron de renovigo, kun la apogo de la Franca Turisma Klubo, kiu tuj komprenis ĝian intereson, la kastelo kaj la eskarpadoj kiujn ĝi superregas, estis malaperintaj sub la dornarbetaĵaro; flankaj muroj trakavitaj, tegmentoj tra kiuj filtradas akvon, ŝtuparoj el ŝanceliĝantaj ŝtupoj, ŝajne defiis ĉiun rebonigon. Kaj hodiaŭ, dank'al la sola laboro de siaj du 'konservatoroj' (1) ekcigitaj de la sama fido, la muzeo posedas ne malpli ol 5000 objektojn katalogitajn kaj la nombro de la vizitantoj en 1951 atingis la rekordnombron de 188'895.

La muzeo de Châteaufort laŭ tiu vidpunkto, klasiĝas kiel la tria en Francujo; superita nur de tiuj de Louvre kaj de Versailles. Estas kondensiĝo de la vivo de la pirenea montarano, kiu prezentas sin en la dudekses salonoj de la muzeo Ĉi tie estas rekonstitucio - laŭte parolanta pro natureco - de kuirejo el Bearnais, kun personoj el normalaj mezuroj; tie estas la ilaro por la teksado aŭ tiuj por familia manlaborado; same tiuj de la terkulturo, inter kiuj meritas atenton la antikvaj kaj respektinda lignaj plugiloj de la valo Aure. Pli poste estas la malnovaj oleolampoj, ĉiuj objektoj rilataj al la paŝtista industrio, la grandegaj sonoriletaroj de la bovoj, la elegantaj surjugo el skulptita kaj pentrita ligno; la 'tracins' t.e. la funebraj vaksokandeloj, kiujn oni bruligis dimanĉe dum tutan jaron sur la sidloko jam okupita dumvive de la mortintoj.

Kaj kiom multe da objektoj ankoraŭ! Estus necese citi ankaŭ la belajn kolektojn de fajencoj de Samadet, la salonon de industrio de la lakto, kun la serio da potoj fortranĉitaj el plena ligno; tiun rezervitan al la fabrikado de la lignaj ŝuoj k.c. Ĉiuj mil objektoj kiuj ĉirkaŭas la vivon de la kamparano en sia ĉiutaga vivo, de la humila ligna kulero ĝis la riĉa kostumo de la festotagoj estas kunigitaj sub niaj okuloj kaj savitaj de la forgeso. Kaj pri la historio mem oni ne povas preterlasi la gravajn kolektojn de reproduktaĵoj de blazonoj kaj de sigeloj de l'suda Francujo.

Je tiu sintezo de folkloro aldoniĝas la materiigo de la memoro; la vasta honorsalono estas konsekrita al la rememorigo de la konkero de la montaro fare de la pireneistoj. Ĉiuj kiuj suprenrampis la montopintojn: de Ramond Russell, kaj Saint Saud, ĝis la bedaŭrata Ludviko Le Bondidier, estas tie reprezentitaj per siaj statuoj, medalionoj aŭ fotografaĵoj, aŭ de la objektoj al ili apartenintaj: pikfosiloj, notlibretoj de vojago, geodeziaj instrumentoj. (2)

Naturscienco - kvankam nur flankaj ĉi tie - ne estas forgesita; la salono de la marbroj montras la plej belajn specimenojn de la pireneaj minejoj, alia salono estas dediĉita al la plej spektaklaj animaloj inter kiuj la ĉamoj kaj la ursoj, kaj al la antikvaj kaptuloj kiujn oni uzadis por ilia kaptado.

Ĉio ĉi estas enfine muzeo kiel iu ajn alia - oni eble diros! Muzeo ĝi estas certe - kiel iu ajn alia - ne.

(1) S-ro Le Bondidier mortis la 8n de febr. 1945. Lia tombo estas konstruita, en la Cirko de Gavarnie.

(2) Du pintoj en la Pireneoj portas la nomojn de s-ro Bondidier kaj lia edzino.

Ĉiu muzeo, posedas sendube sian propran personecon, kiu, kelkfoje, aliflanke, estas necese diri, estas iom malvarma kaj malproksima (seninteresa) por la simpla vizitanto. Kontraŭe ĉi tie, aldoniĝas originaleco el bona alojokaj tre speciala kiu donas al ĝi ĉefan allogon. Ĉar kontraŭe je multaj aliaj la pirenea muzeo ne kontentiĝas konservi kaj prezenti: ĝi rekonstruas kaj estas tie kie vidiĝas la verko al kiu sin dediĉis tute kaj sen rezerve la nuna konservistino, S-ino Le Bondidier, kiu postvenis sian edzon, kaj kiu estas helpata de tre sindona kunlaborantaro.

En la ekspoziciaj salonoj, multenombraj dioramoj montras scenojn de la montarana vivo: edziĝojn, taŭrajn kurludojn, kamparajn dominternajojn, vilaĝajn festojn. Entuziasma kolekto de centoj da religiaj pupoj, el neesprimeblaj fizionomioj estas kolektita en eta klostro, kiel ili montras la kostumojn de la plej malsamaj inaj religiordenoj.

Ekstere plataĵo de la roko 'esplanade' estas utiligita por la rekonstruo de kurioza baska mortintejo; la antikvaj tomboj el la rimarkindaj diskoidaj steleoj estas fidele reproduktitaj en skulptita cemento: apud ili estas sarkofagoj - aŭtentikaj tiuj ĉi - malkovritaj okaze de traserĉoj faritaj en la urbo Lourdes.

Sed inter ĉiuj realigaĵoj la plej pentrinda, tiu kiu plej altiras la amason de la turistoj kaj de la pilgrimoj kaj efektive popularigis la muzeon, estas protektata sub la platano de la 'esplanade des chevaliers (planaĵo de la kavaliroj)'. Ni intencas diri pri la rekonstruoj en skalo 1/10 de la ĉefaj tipoj de loĝejoj de la francaj kaj hispanaj Pireneoj. Kampara duoncirka mastrodomo de provinco Léon, domo el plataj tegeloj de Salis de Béarn, fortikigita preĝejo de Luz, vilaĝo de Aragon kunprenanta dudek domojn el pluraj etaĝoj, striktaj sur ilia roko kaj dividitaj ĉirkaŭ tri stratoj kaj figuritaj tiel science fidele ke tiuj skizaĵoj fariĝis unuarangaj etnologiaj kaj arkitekturaj dokumentoj.

La ĉefverko inter tiu serio estas ankaŭ la laste naskita, ĉar ĝi estas apenaŭ unujara. Estas la skizo de la tuta vilaĝo Saint-Bertrand-de-Cominges, kun siaj 98 domoj el ruĝaj tegmentoj kiuj sternas sur la flanko de roko, sub la protekto de fiera katedralo. Oni scias ke Saint Bertrand, dekadinta vilaĝo kiu nun ne kalkulas pli ol kelkajn centojn da loĝantoj, estis iam episkopa sidejo. Ties antikva famo estas montrata nuntempe de malnovaj remparoj, de mezepokaj domoj, de klostro el delikataj kolonoj, kaj de katedralo kies kanonikseĝoj estas ornitaj de skulptaĵoj en plena kverkligno, taksataj inter la plej belajn en Francujo. La reprodukto de la vilaĝo, kiu estas ĉirkaŭita de kolekto de alpaĵaj plantoj, montras tiel fidele ĉiun detalon, ke diversaj loĝantoj de Saint Bertrand jam venis sur la 'esplanade' por tie rekoni sian domon, al kiu ne mankas fenestro nek kameno. Ĉiuj ĉi rekonstruaĵoj estas verko de S-ino Le Bondidier.

La tuto meritis pli kompletan priskribon: sed ne estas sufiĉe da spaco. Tamen estas oportune menciigi ankoraŭ la ĝardenon el ŝtonoj kovritaj de multkoloraj floroj kaj trairita - mirindaĵo - de rivereto el akvoj tie kaj tie faletantaj, la antikvan kapelon kun siaj primitivaj statuoj el pentrita ligno, la bibliotekon enhavantan pli ol dekkvarmil volumojn konsekritajn unike al Pireneoj kaj ties ĉirkaŭaĵoj, kaj super ĉio la mirinda panoramo videbla de la 'esplanade' kaj de la masiva fortikturo ĝin superreganta.

Turisto, same kiel artisto aŭ specialisto (fakulo) pri pasintaĵoj sin devigas koni la pirenean muzeon kiu samtempe revivigas la malnovajn uzadojn kaj lalokan antikvan historion en la plej bela el la naturaj kadroj.

Religia kredo kreis la pilgrimadon al la Groto de Bernadette, la respekto al la pasinta tempo kaj la amo al belo pravigas la supreniron al 'Châteaufort'.

(de Raymond Decary, esper. A. L. R. 30/3.1952a.)

FAKTOJ el la MOVADO

La 13a Hispana Kongreso de Esperanto (26-29 julio pasinta) en Valencia estis granda sukceso. Partoprenis 302 personoj, inter kiuj 43 eksterlandanoj. Vicprezidanto estis pastro J. Casanovas, kiu ankaŭ predikis dum ke pastro J. Argaya frato de la dioceza helpa episkopo, celebris la s. meson, por propravole pligravigi la religian solenaĵon de la esperantistoj. Nia eminenta membro s-ro L. Minnaja el Romo gajnis la unuan premion en la Literatura Konkurso per sia Kristnaska poemo 'Mia preĝo'. Ni gratulas!

En Guatemala (Latin-Ameriko) okazis ekspozicio internacia de infanaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj. La katalogon en hispana kaj esperanta lingvo eldonis la Ministerio de Edukado. Ĝi enhavas 260 numerojn el la tuta mondo!

* * *

Laŭ la fotografaĵo en 'Dia Regno' partoprenis al la KELI-konferenco ĉi-somere en Fredtun 60 partoprenantoj, el kiuj 20 viroj, Ni ne miras ke ili montras gajan dorlotitan vizaĝon. Certe la kunveno portis sukceson al ilia organizo.

* * *

En Lindaŭ (Germanujo) okazis la 14a Internacia Kongreso de Fervojistaj Esperantistoj. Partoprenis 482 personoj el 11 landoj. La germana fervoja kompanio donis gravan moralan kaj materialan subtenon.

* * *

Trygve Lie, generala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, vojaĝis flugmaŝine de Oslo al New York. En la sama aeroplano estis s-ro d-ro F.W. Brent, reprezentanto de la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko. Ili ambaŭ priparolis la lingvan problemon. S-ro Lie diris ke li estis bone informita pri Esperanto, kiel ideo kapabla alproksimigi la naciojn unu al la alia kaj ĝi havas lian plenan simpatian. Pri la ŝancoj de Esperanto ĉe la U.N.O. li diris, ke ni devas havi paciencon; la homaro estas malvigla en la akceptado de novaj ideoj. Li persone estas favora al ĝi, ne nur kiel la ĝenerala Sekretario de la U.N.O. sed ankaŭ kiel Norvego. En persona letero s-ro Lie poste aprobis la publikigon de sia opinio!

NOVAJ ELDONOJ

MANRESA, eldono de Esperanto-Fako de Lingua Club. Belaspekta ilustrita priskribo de la urbo. (Esperanto-Hispana eldono).

POŝTKARTO kun la portreto de Beata Papo Pio Xa kun aprobata preĝo. Eldono de la Unio de Italaj Katolikaj Esperantistoj. Oni mendu ĉe s-ro Reni, Via Rovereto 6, VERONA (Italujo). 2 ekz. por 1 Int.Rkp. aŭ koresponda valoro en memorigaj poŝtmarkoj (neuzitaj) de via lando, aŭ per monbiletoj.

Por pli ol 20 ekz. rabato.

JARLIBRO de UEA (dua parto) 1952. Donas raportojn financajn kaj ligajn de UEA la Akademio, landaj kaj fakaj asocioj. Estas aldonita Fervoja Terminaro pri esploroj, konstruado kaj pontado.

ESPERANTOMISSIONEN el Nora Stad (Svedujo) eldonis jam 4 broŝureteojn pri kelkaj religiaj temoj. La eldono estas subvenciata de svedaj kristanoj (protestantoj). Ni admiras tiujn laboremon kaj oferejon.



KORESPONDADO

s-ro R. Olivauz, optikisto, Allée Brancas, NANTES (L. Inf.) Francujo kun alilandaj franciskanoj de la tria ordeno.

s-ro Folkert Bijlard, Gooiberg 18, BUSSUM, Nederlando k.ĉ.l.-p.ĉ.t.

Johano Necol (13-jara) San Martin 1166, SANTOS LUGARES, F.C.N.G.S.M. Argentino per ilustritaj poŝtkartoj.

NIA INTERNACIA KUNVENO okazos en 1953 en LOURDES kiel Pilgrimo al Nia Sinjorino. La datoj estas 12-16 aŭgŭsto. En la venonta numero de E.K. ni donos detalajn komunikaĵojn.

La loka komitato devis unue fini la nunan sezonon.